

## Invito al Bad Salzuflen

## Einladung nach Bad Salzuflen



Motorvagono de WestfalenBahn enveturanta  
la stacion Bad Salzuflen (vd. p. 5)  
(foto Guido Brandenburg)

Triebwagen der WestfalenBahn bei der  
Einfahrt in den Bf Bad Salzuflen (s. S. 5)  
(Foto Guido Brandenburg)

Karaj gelegantoj	2	Liebe Leserinnen und Leser	2
Ŝanĝoj en kotizpago	3	Änderungen in der Beitragszahlung	3
Gießner-ekspozicio en kastelo Herzberg	4	Gießner-Ausstellung im Schloss Herzberg	4
Bonvenon en Bad Salzuflen	5	Willkommen in Bad Salzuflen	5
Aliĝilo por la GEFA-jarkunveno 10.-12.10.2014	7	Anmeldeblatt für die GEFA- Jahresversammlung 10.-12.10.2014	7
El terminologia laboro	9	Aus der Terminologiearbeit	9
Elfriede Kruse dankas	10	Elfriede Kruse dankt	10
La GEFA-laborkomisiono hodiaŭ	10	Der GEFA-Arbeitsausschuss heute	10
Trovitaĵoj el la koalicia kontrakto	11	Fundsachen aus dem Koalitionsvertrag	11
GEFA-anoncoj, redakcio	12	GEFA-Mitteilungen, Redaktion	12



### Karaj gelegantoj,

la fondaĵo BSW estas sociala organizo subtenanta aktivajn kaj iamajn fervojistojn. Ĝi disponigas feriajn hotelojn, ĝi organizas vojaĝojn, ĝi ofertas konsulton kaj helpon en krizaj situa-

cioj, ĝi prizorgas orfojn kaj nelaste ĝi subtenas libertempajn grupojn kaj nacie kiel internacie agantajn kulturajn grupojn – kiel nian GEFA. Ni GEFA-membroj do profitas de la fondaĵo BSW.

La rimedojn disponigas la individuaj subtenantoj (t.e. unuopaj fervojistoj, iamaj fervojistoj kaj iliaj familianoj, la „destinuloj“, kiuj deklaris sian solidarecon per monata kontribuo) kaj la subtenantaj institucioj (t.e. la fervojaj entreprenoj kaj administracioj).

BSW-grupon en pasinteco nur povis fondi la cititaj „destinuloj“. Simpatiantoj ekster tiu cirklo povis membriĝi en la grupo, sed estis tolerataj nur tiel longe, kiel la subtenantaj „destinuloj“ formis la majoritaton.

Nun la fondaĵo BSW batalas same kontraŭ la malkresko de la subtenantaro kiel la Esperanto-asocioj kontraŭ la malkresko de la membraro. Por kontraŭstari tion, BSW nun unuflanke postulas konvinki ĉiujn grupanojn, ke ili registriĝu kiel BSW-subtenantoj. Aliflanke ĝi malfermas la ekskluzivan rondon de la „destinuloj“ al la nefervojistoj en la grupoj.

Mia opinio temas pri justa afero, ne nur pro la bono de GEFA, sed nelaste ankaŭ pro la individuaj avantaĝoj ofertitaj.

Mi tial permesas al mi apelacii al la GEFA-membroj: Kontaktu vian distriktkomisiit(in)on kaj fariĝu BSW-subtenanto, se vi ne jam estas.

Salutas vin  
Guido Brandenburg

### Liebe Leserinnen und Leser,

die Stiftung BSW ist eine Sozialeinrichtung, die aktive und ehemalige Eisenbahner unterstützt. Sie stellt Ferienhotels zur Verfügung, sie organisiert Reisen, sie bietet Beratung und Hilfe in Krisensituationen, sie betreut Waisen und sie unterstützt nicht zuletzt Freizeitgruppen und national und international agierende Kulturgruppen – wie unsere GEFA. Wir GEFA-Mitglieder profitieren also von der Stiftung BSW.

Die Mittel dafür stellen die individuellen Förderer (d.h. die einzelnen „Destinatäre“, welche sich durch einen monatlichen Beitrag solidarisch erklärt haben) und die Fördereinrichtungen (d.h. die Eisenbahnunternehmen und –verwaltungen) zur Verfügung. Eine BSW-Gruppe konnten in der Vergangenheit nur die zitierten „Destinatäre“ gründen. Sympathisanten außerhalb dieses Kreises konnten Mitglied in den Gruppen werden, wurden jedoch nur so lange toleriert, wie die fördernden „Destinatäre“ die Mehrheit bildeten. Nun kämpft die Stiftung BSW ebenso gegen den Förderer-Schwund wie die Esperanto-Verbände gegen den Rückgang der Mitglieder. Um dem entgegenzuwirken, verlangt das BSW nun einerseits, alle Gruppenmitglieder davon zu überzeugen, dass sie sich als BSW-Förderer registrieren. Andererseits öffnet es den exklusiven Kreis der „Destinatäre“ den Nichteisenbahnern in den Gruppen.

Meiner Ansicht nach handelt es sich um eine gerechte Sache, nicht nur zum Wohle der GEFA, sondern nicht zuletzt auch wegen der angebotenen individuellen Vorteile.

Ich erlaube mir deshalb, an die GEFA-Mitglieder zu appellieren: Setzt euch mit dem/der Bezirksbeauftragten in Verbindung und werdet BSW-Förderer, wenn ihr es nicht schon seid.

Es grüßt euch  
Guido Brandenburg

## Ŝanĝoj en la kotizpago

Vi memoras pri la informo rilate „IBAN, BIC kaj SEPA“ en la pasinta eldono, en kiu ni anoncis, ke la enkonduko de la „Unueca Pago-Zono Eŭropa“ la 01.02.2014 ankaŭ por GEFA ion ŝanĝas. Koncernitaj estas tiuj membroj, kiuj pagis sian kotizon per metodo de debita komisio.

La Sparda-bankoj, kie estas administrataj ĉiuj niaj kontoj, akceptas la SEPA-mandaton, la anstataŭaĵon de la antaŭa debita permeso, nur ankoraŭ elektronike. La kostoj por havigo kaj flegado de konvena komputila programo ne estus en tolerebla rilato al niaj malaltaj kotizoj. Ĝi estas tro kosta. La debita komisio por GEFA tial ne plu estas je dispono.

La distriktkomisiitoj petas tial ĉiujn membrojn, kiuj estas donintaj debitan permeson, instali ĉe ilia banko ripetan ĝirkomision.

En la diversaj distriktoj la kotizo estu ĝirata al la sekvantaj kontoj:



### GEFA-distrikto okcidenta

Sparda-Bank West

IBAN: **DE 4436 0605 9100 0050 4563**

BIC: **GENODED1SPE**

### GEFA-distrikto suda

Sparda-Bank Baden-Württemberg

IBAN: **DE 2960 0908 0000 1070 2486**

BIC: **GENODEF1S02**

### GEFA-distriktoj norda kaj orienta

Sparda-Bank Hannover

IBAN: **DE 4225 0905 0000 0092 1637**

BIC: **GENODEF1S09**

## Änderungen in der Beitragszahlung

Ihr erinnert euch an die Information über „IBAN, BIC und SEPA“ in unserer letzten Ausgabe, in der wir angekündigt haben, dass sich die Einführung des „Einheitlichen Zahlungsraums Europa“ zum 01.02.2014 auch für die GEFA etwas ändert. Betroffen sind diejenigen Mitglieder, die ihren Beitrag bisher im Lastschriftverfahren gezahlt haben.

Die Sparda-Banken, bei denen alle unsere Konten geführt werden, akzeptieren das SEPA-Basismandat, den Ersatz für die bisherige Einzugsermächtigung, nur noch elektronisch. Die Kosten für Anschaffung und Pflege eines dafür geeigneten Computer-Programms stünden jedoch in keinem zumutbaren Verhältnis zu unseren niedrigen Beiträgen. Sie ist zu teuer. Der Beitragseinzug steht der GEFA damit als Zahlungsverfahren nicht mehr zur Verfügung.

Die Bezirksbeauftragten bitten daher alle Mitglieder, die ihnen einen Einziehungsermächtigung erteilt hatten, bei ihrer Bank einen Dauerauftrag einzurichten.

In den verschiedenen Bezirken soll der Beitrag auf die folgenden Konten überwiesen werden:

### GEFA-Bezirk West

Sparda-Bank West

IBAN: **DE 4436 0605 9100 0050 4563**

BIC: **GENODED1SPE**

### GEFA-Bezirk Süd

Sparda-Bank Baden-Württemberg

IBAN: **DE 2960 0908 0000 1070 2486**

BIC: **GENODEF1S02**

### GEFA-Bezirke Nord und Ost

Sparda-Bank Hannover

IBAN: **DE 4225 0905 0000 0092 1637**

BIC: **GENODEF1S09**

## Joachim Gießner – Esperanto kaj Fervojo Honoriga ekspozicio en kastelo Herzberg

Konvinki, elkovi ideojn kaj organizi tutcerte apartenis al la fasko de talentoj, pri kiu disponis Joachim Gießner, la influhava esperantisto kaj fervojisto. Tiun impreson kunprenis la ĉirkaŭ 30 partoprenantoj de la inaŭguro de la speciala ekspozicio en la kastela muzeo de Herzberg. Lia 100-a naskiĝtago estis okazo por kompili kolekton da memoraĵoj el lia Esperanto-movada vivo. Bonvenigaj vortoj de la urbestro Gerhard Walter kaj konciza enkonduko de Peter Zilvar, gvidanto de Interkultura Centro Herzberg (ICH) spicita per anekdotoj el propra memoro, preparis la gastojn antaŭ la promeno preter la vitrinoj. Tie prezentiĝas unikaĵoj kiel la manskribita fondoprotokolo de la Internacia Fervoja Esperanto-Federacio (IFEFF), ekzemploj el la traduka laboro de Joachim Gießner, etikedoj, insignoj kaj medaloj, internacia sortimento de Esperanto-fervojistaj gazetoj, kompaktdisko kaj kasedoj de li produktitaj kaj aŭtografo de Udo Jürgens, kun kiu li planis – bedaŭrinde fiaskintan – Esperanto-projekton.



La Fondoprotokolo de IFEFF - das Gründungsprotokoll der IFEFF

Okaze de la ekspozicio la Germana Esperanto-Centro eldonis broŝuron kun titolo "De Herzberg sur reloj en la mondon", kie troveblas personaj atestoj kaj raportoj pri Joachim Gießner kaj lia laboro, dokumentoj kaj fotoj. Ĝi estas mendebla ĉe Interkultura Centro Herzberg (ICH) Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg/Harz.

La ekspozicio antaŭvideble daŭros ankoraŭ ĝis la 28.05.2014.

Guido Brandenburg

## Joachim Gießner – Esperanto und Eisenbahn Ehrenaussstellung im Schloss Herzberg

Zu überzeugen, Ideen auszubrüten und zu organisieren gehörte ganz sicher zu dem Bündel von Talenten, über das Joachim Gießner, der einflussreiche Esperantist und Eisenbahner



Afabila, kvankam ne tute aŭtentika – la „Salut-Aŭgusto“  
Freundlich, wenn auch nicht ganz authentisch – der „Grüß-August“

verfügte. Diesen Eindruck nahmen die etwa 30 Teilnehmer von der Vernissage der Sonderausstellung im Schlossmuseum von Herzberg mit. Sein 100. Geburtstag war Anlass, eine Kollektion von Erinnerungsstücken aus seinem Leben in der Esperanto-Bewegung zusammenzustellen. Willkommensworte des Bürgermeisters Gerhard Walter und eine prägnante Einführung von Peter Zilvar, Leiter des Interkulturellen Zentrums Herzberg (ICH), gewürzt mit Anekdoten aus der eigenen Erinnerung bereiteten die Gäste auf den Rundgang vorbei an den Vitrinen vor. Dort stellen sich Unikate vor, wie das handgeschriebene Gründungsprotokoll der Internationalen Föderation der Eisenbahner-Esperantisten (IFEFF), Beispiele aus der Übersetzungsarbeit Joachim Gießners, Klebemarken, Abzeichen und Medaillen, ein internationales Sortiment von Zeitungen der Eisenbahner-Esperantisten, von ihm produzierte CD und MC und ein Autogramm von Udo Jürgens, mit dem er ein – leider gescheitertes – Esperanto-Projekt geplant hatte. Aus Anlass der Ausstellung hat das Deutsche Esperanto-Zentrum eine Broschüre mit dem Titel „Ab Herzberg auf Schienen durch die Welt“ herausgegeben, wo sich viele persönliche Zeugnisse und Berichte über Joachim Gießner und seine Arbeit finden, sowie Dokumente und Fotos. Sie kann bezogen werden beim Interkulturellen Zentrum Herzberg (ICH), Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg/Harz

Die Ausstellung wird voraussichtlich noch bis zum 28.05.2014 dauern.

(trad. Brandenburg)

## Bonvenon en Bad Salzuflen 10.-12.10.2014

### La domo

La vilao Dürkopp estis la privata sidejo de Nikolaus Dürkopp, posedanto de kudromaŝin-fabriko en Bielefeld. Kiel vigla entreprenisto li observis la merkaton kaj aldonis al la produktpaledo



ankaŭ biciklojn, motorciklojn kaj aŭtomobilojn. Investinte multe da mono kaj energio en la aŭtomobilproduktadon li post 18 jaroj fine devis entombigi tiun iniciaton, ĉar lia amo al ideoj kaj detaloj ne permesis grandajn profitigajn seriojn. Bicikloj kaj motorcikloj tamen estis konstruataj ĝis 1961. La firmao hodiaŭ post kelkaj vendoj kaj strukturaj ŝanĝoj ankoraŭ ekzistas. La akcentoj estas nun sur proviza transporttekniko kaj kudromaŝinoj. Nikolaus Dürkopp konstruigis la novbarokan vilaon ekde 1914/15 kaj uzis ĝin ĝis sia morto en 1918. Post la vendo ĝi servis kiel porinfana kuracejo kaj nun estas unu el la hoteloj de fondaĵo BSW. En du poste aldonitaj konstruaĵoj troviĝas pliaj gastĉambroj kaj konferencoj. Ne ĉiuj situoj teretaĝe respektive estas atingeblaj per lifto. Tial ni demandas en aliĝilo pri via kapablo venki ŝtuparojn.

### La fakprogramo

Vendredon vespere ni proponos enkondukon en la regad- kaj sekurigan teknikon por regionaj linioj. Prezentataj estos elementoj kaj strukturoj de la sistemo ZSB2000 de Scheidt&Bachmann. La prelego preparu la fakultativan viziton en la regiona regadcentro (RRC) Lage la sekvontan sabatmatenon.

### La turisma programo

La sabata ekskurso kondukos vin al la distrikto

## Willkommen in Bad Salzuflen 10.-12.10.2014

### Das Haus

Die Villa Dürkopp war der Wohnsitz von Nikolaus Dürkopp, Besitzer einer Nähmaschinenfabrik in Bielefeld. Als lebhafter Unternehmer beobachtete er den Markt und ergänzte seine Produktpalette durch Fahrräder, Motorräder und Automobile. Nachdem er viel Geld und Energie in die Automobilproduktion investiert hatte, beendigte er nach 18 Jahren schließlich diese Initiative, weil seine Liebe zu Ideen und Details keine großen, profitablen Serien erlaubte. Fahrräder und Motorräder wurde trotzdem bis 1961 gebaut. Die Firma existiert nach einigen Verkäufen und Strukturänderungen heute noch. Die Akzente liegen jetzt auf Fördertechnik und Nähmaschinen. Nikolaus Dürkopp ließ die neobarocke Villa von 1914/15 an bauen und nutzte sie bis zu seinem Tod 1918. Nach dem Verkauf diente sie als Kinderklinik und ist nun eines der Hotels der Stiftung BSW. In zwei später hinzugefügten Gebäuden finden sich weitere Gästezimmer und Tagungsräume. Nicht alle liegen im Erdgeschoss bzw. sind über Lift erreichbar. Darum fragen wir im Anmeldeblatt nach eurer Fähigkeit, Treppen zu bewältigen.



### Das Fachprogramm

Freitagabend bieten wir eine Einführung in die Leit- und Sicherungstechnik für Regionalstrecken an. Vorgestellt werden Elemente und Strukturen des Systems ZSB2000 von Scheidt&Bachmann. Der Vortrag soll den fakultativen Besuch der Regionalen Betriebszentrale (RBZ) Lage am folgenden Samstagmorgen vorbereiten

### Das touristische Programm

Der Samstagsausflug wird euch zur Bezirks-

ĉefurbo Detmold, kie antaŭ nun 54 jaroj estis fondata la landa muzeo pri vestfalia kulturo, hodiaŭ propraindike kun 100 historiaj konstruaĵoj sur areo de 90 hektaroj plej granda subĉiela muzeo de Germanio. La vojon ni konfidus al fakscia gvidanto. Por tagmanĝo estos je dispono la gastronomio de tri diversaj muzeaj restoracioj. Dimanĉon matene ni inspektos unue la historian urbocentron de Bad Salzuflen, tiam la internon de unu el la vaporigaj kradoj, kiuj zorgas por la agrabla marklimato de la urbo kaj kontribuas al la specifaj ofertoj de la ŝtata banloko.

### GEFA-laborkomisiono

La amplekso de la pritraktenda tagordo necesigas komenci la kunsidon jam vendredon, 10.10.2014 post la matenmanĝo. La membroj de la laborkomisiono estas petataj alvojaĝi **ĵaŭdon, 09.10.2014**. Bonvolu atenti la koncernajn indikojn sur la aliĝilo.

hauptstadt Detmold führen, wo vor jetzt 54 Jahren das Westfälische Landesmuseum für Volkskunde gegründet wurde, heute nach eigener Angabe mit 100 historischen Gebäuden auf einer Fläche von 90 Hektar das größte Freilichtmuseum Deutschlands. Den Weg werden wir einem versierten Führer anvertrauen. Für das Mittagessen steht die Gastronomie dreier verschiedener Museumsrestaurants zur Verfügung. Sonntagmorgen werden wir erst die Altstadt Bad Salzuflens untersuchen, dann das Innere eines der Gradierwerke, welche für das angenehme Meeresklima der Stadt sorgen und zu den spezifischen Angeboten des Staatsbades beitragen.

### GEFA-Arbeitsausschuss

Der Umfang der zu behandelnden Tagesordnung macht es notwendig, mit der Sitzung bereits Freitag, 10.10.2014 nach dem Frühstück zu beginnen. Die Mitglieder werden gebeten, **Donnerstag, 09.10.2014** anzureisen. Beachtet bitte die entsprechenden Hinweise auf dem Anmeldezettel.

Aliĝadreso/Anmeldeadresse:	Manfred Retzlaff, Stettiner Straße 16, 59302 Oelde
Konto:	GEFA Bezirk West, M. Retzlaff, „Jarkunveno 2014“ IBAN: DE 4436 0605 9100 0050 4563, BIC: GENODED1SPE
Aliĝu ĝis / Meldet euch an bis:	<b>Mardo / Dienstag, 01.07.2014</b>

programo		Programm	
09.10.2014	-18.00	alvojaĝo laborkomisiono	Anreise Arbeitsausschuss
10.10.2014	09.00-18.00	konferenco laborkomisiono	Tagung Arbeitsausschuss
	-18.00	alvojaĝo gastoj	Anreise Gäste
	20.00-21.30	„Regad- kaj sekuriga tekniko por regionaj linioj“	„Leit- und Sicherungstechnik für Regionalstrecken“
	21.30-XX.XX	malstreĉita kunestado	Lockeres Beisammensein
11.10.2014	09.15	ekvojaĝo vizitantoj RRC Lage	Abreise Besucher RBZ Lage
	10.15	ekvojaĝo al muzeo Detmold	Abreise zum Museum Detmold
	18.40	reveno de Detmold	Rückkehr von Detmold
	20.00-XX.XX	vespera programo, poste malstreĉita kunestado	Abendprogramm, danach lockeres Beisammensein
12.10.2014	9.45-12.30	urbogvidado kaj vaporiga krado	Stadtführung und Gradierwerk
	13.00	tagmanĝo resp. forvojaĝo	Mittagessen bzw. Abreise

*Marĝene:* Por la vojo de stacio al Villa Dürkopp la mastroj rekomendas Taxi-Kixmüller (telefono 05222-1414), kun kiuj ili kontraktis pri fiksita prezo de 6,30 € po veturo.

*Nebenbei:* Für den Weg vom Bahnhof zur Villa Dürkopp empfehlen die Verwalter Taxi-Kixmüller (Tel. 05222-1414), mit denen sie einen Festpreis von 6,30 € je Fahrt vereinbart haben.

## Aliĝanta por la GEFA-jarkunveno 10.-12.10.2014 en Bad Salzufen Anmeldeblatt für die GEFA-Jahresversammlung in Bad Salzufen

*aliĝanta persono*  
*anmeldende Person*

antaŭnomo Vorname		familia nomo Familiennome
Adreso Adresse		
BSW-subtenanto, familiano BSW-Förderer, Familienmitglied .....		<input type="checkbox"/>
irmalhelpita gehbehindert .....		<input type="checkbox"/>
partopreno en vizito al Regiona Regadcentralo Lage Teilnahme am Besuch Regionale Bedienzentrale Lage .....		<input type="checkbox"/>

*dua persono en dulita ĉambro*  
*zweite Person im Doppelzimmer*

antaŭnomo Vorname		familia nomo Familiennome
Adreso Adresse		
antaŭnomo Vorname		familia nomo Familiennome
BSW-subtenanto, familiano BSW-Förderer, Familienmitglied .....		<input type="checkbox"/>
irmalhelpita gehbehindert .....		<input type="checkbox"/>
partopreno en vizito al Regiona Regadcentralo Lage Teilnahme am Besuch Regionale Bedienzentrale Lage .....		<input type="checkbox"/>



*aliĝanta persono*  
*anmeldende Person*

Partoprenkotizo (inkl. taga ekskurso Detmold) Teilnahmebeitrag (einschl. Tagesfahrt Detmold)		25,00 €	
Unulita ĉambro 2 noktoj Einzelzimmer 2 Nächte (2x40,68 €)	81,36 €	_____ €	
<i>Alvojaĝo 09.10.2014 aldona nokto<sup>1</sup></i> <i>Anreise 09.10.2014 zusätzl. Nacht (40,68 €)</i>	40,68 €	_____ €	
Dulita ĉambro 2 noktoj Doppelzimmer 2 Nächte (2x72,38 €)	144,76 €	_____ €	
<i>Alvojaĝo 09.10.2014 aldona nokto<sup>1</sup></i> <i>Anreise 09.10.2014 zusätzl. Nacht (72,38 €)</i>	72,38 €	_____ €	
Gvido historia urbcentro, vaporega krado Führung historisches Stadtzentrum, Gradierwerk	10,00 €	_____ €	
Kafo vendredon, 10.10.2014 Kaffee Freitag, 10.10.2014	5,04 €	_____ €	
Tagmanĝo dimanĉon, 12.10.2014 Mittagessen Sonntag, 12.10.2014	6,72 €	_____ €	
<i>Alvojaĝo 09.10.2014 aldona tagmanĝo sabaton, 10.10.2014<sup>1</sup></i> <i>Anreise 09.10.2014 zusätzl. Mittagessen Samstag, 10.10.2014</i>	6,72 €	_____ €	

*dua persono en dulita ĉambro*  
*zweite Person im Doppelzimmer*

Partoprenkotizo (inkl. taga ekskurso Detmold) Teilnahmebeitrag (einschl. Tagesfahrt Detmold)		25,00 €	
Gvido historia urbcentro, vaporega krado Führung historisches Stadtzentrum, Gradierwerk	10,00 €	_____ €	
Kafo vendredon, 10.10.2014 Kaffee Freitag, 10.10.2014	5,04 €	_____ €	
Tagmanĝo dimanĉon, 12.10.2014 Mittagessen Sonntag, 12.10.2014	6,72 €	_____ €	
<i>Alvojaĝo 09.10.2014 aldona tagmanĝo sabaton, 10.10.2014<sup>1</sup></i> <i>Anreise 09.10.2014 zusätzl. Mittagessen Samstag, 10.10.2014</i>	6,72 €	_____ €	

Entute ĝirita al  
Insgesamt überwiesen an \_\_\_\_\_ €

Konto „GEFA Bezirk West, M. Retzlaff“  
IBAN: DE 4436 0605 9100 0050 4563, BIC: GENODED1SPE


<sup>1</sup>) Nur por GEFA-laborkomisiono / nur für GEFA-Arbeitsausschuss



**El terminologia laboro:  
Diferencigo inter teknikaj kaj trafikaj  
nocioj**

Ĉiam denove mi konstatas misuzon de la radikoj „trajn-“ en artikoloj, se temas pri produktaĵoj konsistantaj el pluraj kombinitaj (motor)vagonoj. La ĝis nun plej longa diskuto de IFEF-Terminara Sekcio – en jaro 2000 – okazis kun la fina decido „(motor)vagonkombinaĵo“, ĉar „trajno“ ja estas pure trafika – do ne teknika – nocio. Jen detala trakto de diferencigo inter tiaj teknikaj, trafikaj kaj teknik-trafficaj nocioj.

**1. La veturilindustrio** fabrikas kaj vendas siajn produktaĵojn al fervojaj entreprenoj:




Komuna termino por motorvagono kaj lokomotivo estas „trakciilo“. Veturilkombinaĵo konsistas el pluraj veturiloj interligitaj ne per normala trafika kuplilo, sed per firmkuplilo aŭ ĉasia artikolo.

**2. Veturplanistoj** en fervojaj entreprenoj fiksis trajnojn en horaro. Trajnon karakterizas kategorio (vara, pasaĝera, regiona, rapida, ekspresa ktp), kurso (vojo de sia komenciĝa al sia finiĝa stacio) kaj tempindikoj. Por du sinsekvaj kontraŭdirektaj trajnoj sur la sama linio ekzistas la termino „trajnaparo“.

**Aus der Terminologiearbeit:  
Unterscheidung technischer und  
betrieblicher Begriffe**

Immer wieder stelle ich in Artikeln den fehlerhaften Gebrauch des Wortstamms „trajn“ fest, wenn es um Produkte aus mehreren kombinierten (Trieb-)Wagen geht. Die bisher längste Diskussion in der IFEF-Terminologie-Abteilung fand – im Jahr 2000 – mit der anschließenden Entscheidung für „(motor)vagonkombinaĵo“ statt, weil „trajno“ ja ein rein betrieblicher – also kein technischer – Begriff ist. Hier also eine ausführliche Unterscheidung solcher technischen, betrieblichen und technisch-betrieblichen Begriffe.

**1. Die Fahrzeugindustrie** erzeugt und verkauft ihre Produkte den Eisenbahnunternehmen:



Ein gemeinsamer Begriff für Triebwagen und Lokomotive ist „Triebfahrzeug“. Eine Fahrzeugeinheit besteht aus mehreren Fahrzeugen, die nicht mit einer normal lösbaren Kupplung verbunden sind, sondern mit einer Festkupplung oder einem Rahmen-Gelenk.

**2. Fahrplanbearbeiter** in Eisenbahnunternehmen legen Züge in Fahrplänen fest. Einen Zug charakterisiert eine Kategorie (Güter-, Personen-, Regional-, Schnell-, Expreßzug usw.), ein Laufweg (Weg von seinem Anfangs- bis zu seinem Endbahnhof) und die Zeitangaben. Für zwei aufeinanderfolgende, in Gegenrichtung verkehrende Züge gibt es den Begriff „Zugpaar“.

**3. Precipe manovristoj** estigas la materian konsistaĵon de trajno, do kompletan el ĉiuj siaj veturiloj. Por tio estas decidita la termino trajnkompleto. La nocio koncernas parte tektonikon, parte trafikon.

Trajnkompleto ĉefe konsistas

- aŭ el lokomotivo kuplita kun vagonaro,
- aŭ el motorvagonaro.

Vagonaro povas konsisti

- aŭ el interkuplitaj solovagonoj,
- aŭ el unusola motorvagonkombinaĵo,
- aŭ el interkuplitaj (pleje du) motorvagonkombinaĵoj



Heinz Hoffmann

**3. Insbesondere Rangierer** sorgen für die materielle Bildung eines Zuges, also die Gesamtheit aller seiner Fahrzeuge. Hierfür wurde der Fachbegriff „trajnkompleto“ (deutsch „Zugverband“) beschlossen. Der Begriff betrifft zum einen Teil die Technik, zum anderen Teil den Betrieb.

Ein Zugverband besteht in der Hauptsache

- entweder aus einer Lokomotive gekuppelt mit einem Wagenzug,
- oder aus einem Triebwagenzug.

Eine Wagenzug kann bestehen

- entweder aus untereinander gekuppelten Einzelwagen,
- oder aus einer einzelnen Triebwageneinheit,
- oder aus gekuppelten (meist zwei) Triebwageneinheiten.

(trad. Brandenburg)

### Elfriede Kruse dankas al la gratulintoj



En malgranda sed gaja rondo ankaŭ kun GEFA-aktivuloj Elfriede Kruse festis sian centjariĝon. Ŝi ĝojas pri la granda atento,

kiun kaŭzis tiu evento kaj bedaŭras, ke pro la tedaj, sed neeviteblaj sekvoj de la aĝo ŝi ne kapablas individue respondi al ĉiuj gratulintoj. Anstataŭe – tamen ne malpli persone – ŝi diktis sian saluton en disponigitan poŝtelefonon kaj petis pri la distribuo:

*„Siegfried Krüger estas ĉe mi. Kaj mi eluzas la okazon por saluti ĉiujn miajn geamikojn, kiujn mi dum jaroj konis. Sed bedaŭrinde mi ne plu povas skribi, kaj ĉefe mi povas malbone aŭdi. Sed estu certaj, ke mi neniam forgesos vin“.*

Siegfried tiun deziron fidele plenumis per la rimedoj de la interreto. La transskribitan mesaĝon ni dediĉas al tiuj, kiuj ne povas aŭ ne volas alkruciĝi al la drato.

Guido Brandenburg

### Elfriede Kruse dankt den Gratulanten

In kleiner aber fröhlicher Runde auch mit GEFA-Aktiven, feierte Elfriede Kruse ihren Hundertsten. Sie freut sich über die große Aufmerksamkeit, die dieses Ereignis verursacht hat und bedauert, dass sie wegen der lästigen aber unvermeidlichen Folgen des Alters allen Gratulanten nicht individuell antworten kann. Stattdessen – jedoch nicht weniger persönlich – diktierte sie ihren Gruß in ein zur bereitgestelltes Mobiltelefon und bat um die Verbreitung:

*„Siegfried Krüger ist bei mir. Und ich nutze die Gelegenheit, alle meine Freunde zu grüßen, die ich seit Jahren gekannt habe. Aber leider kann ich nicht mehr schreiben, und hauptsächlich kann ich schlecht hören. Aber seid sicher, dass ich euch nie vergessen werde.“*

Siegfried hat diesen Wunsch mit den Mitteln des Internets getreulich erfüllt. Die transskribierte Nachricht widmen wir denen, die sich nicht verdrahten lassen können oder wollen.

(trad. Brandenburg)

**La GEFA-laborkomisiono hodiaŭ**

Fine de la kunveno la 22.03.2014 en Fulda la laborkomisiono instigis pro la ŝanĝoj en la pasintaj jaroj publikigi ĝian aktualan konsiston.

**Der GEFA-Arbeitsausschuss heute**

Gegen Ende der Sitzung am 22.03.2014 in Fulda regte der Arbeitsausschuss an, wegen der Änderungen in den vergangenen Jahren seine aktuelle Zusammensetzung zu veröffentlichen.

ĉefkomisiito	Achim Meinel (Falkensee)	Hauptbeauftragter	Achim Meinel (Falkensee)
distriktkomisiitoj		Bezirksbeauftragte	
nordo	Karl-Heinz Marzahn (Bremen)	Nord	Karl-Heinz Marzahn (Bremen)
okcidento	Manfred Retzlaff (Oelde)	West	Manfred Retzlaff (Oelde)
sudo	Siegfried Krüger (Heilbronn)	Süd	Siegfried Krüger (Heilbronn)
oriento	Claudia Würker (Reichenbach Vogtl.)	Ost	Claudia Würker (Reichenbach Vogtl.)
kaso GEFA	Karl Berhard (Ludwigshafen)	Kasse GEFA	Karl Berhard (Ludwigshafen)
financoj BSW	Helga Vogelsang (Ellrich)	Finanzen BSW	Helga Vogelsang (Ellrich)
protokolo	Walter Ullmann (Friedberg Hessen)	Protokoll	Walter Ullmann (Friedberg Hessen)
redakcio FE	Guido Brandenburg (Drensteinfurt)	Redaktion FE	Guido Brandenburg (Drensteinfurt)
kontaktoj DB	Bodo Ehrlich (Kassel)	Kontakte DB	Bodo Ehrlich (Kassel)
terminara komisiono	Dr. Heinz Hoffmann (Radebeul)	Terminologie-Kommission	Dr. Heinz Hoffmann (Radebeul)

**El la koalicia kontrakto de CDU kaj SPD, Berlin, 16.12.2013****Aus dem Koalitionsvertrag von CDU und SPD, Berlin, 16.12.2013**

„Der Erwerb der deutschen Sprache ist eine zentrale Voraussetzung für eine gelingende Integration. Wir werden die Angebote zum Erlernen der deutschen Sprache ausbauen. Wir werden das frühe Erlernen der deutschen Sprache gezielt weiter fördern und unterstützen die Maßnahmen zur Auswertung der Sprachstandsdiagnostik und –fördermaßnahmen sowie gemeinsame Standards mit dem Ziel (...) allen Kindern eine individuelle Förderung zu ermöglichen. Die bewährten Instrumente der Außenwirtschaftsförderung (GermanyTrade and Invest) (...) werden wir fortentwickeln (...) level playing field (...) Recycling (...) Monitoring (...) Machine-to-Machine-Kommunikation (...) Open-Source (...) Software made in Germany (...) Hightech (...) LeaderSHIP Deutschland (...) Offshore (...) coachings (...) Crowdfunding (...) next change (...) Post-Doc-Phase (...) Roadmap (...) Open-Access (...) Open-Innovation (...) Cluster (...) liquefied

natural gas (...) open-data-Basis (...) Carsharing (...) Single European Sky (...) Logistics made in Germany (...) Accessprovider (...) Communities (...) Best-Effort-Internet (...) managed Services (...) Deep Packet Inspection (...) carbon leakage (...) Top-Runner-Prinzip (...) backloading (...) Offshore-Wind (...) early actions (...) power-to-heat (...) power-to-gas (...) Flowback (...) Leverage Ratio (...) Financial Action Task Force on Money Laundering (...) Top-Down (...) Business Startups (...) Base Erosion and Profit Shifting (...) country-by-country-reporting (...) Bail-In (...) Diversity (...) Resettlement (...) Eco-Innovation Action Plan (...) Scoring (...) Commerce (...) open data (...) Good Governance Standards (...) Smart Services (...) Smart Grid (...) E-Health (...) Cloud-Computing (...) Big Data (...) One-Stop-Agency (...) Start-Ups (...) Stock-Options (...) Venture Capital (...) Work-Life-Balance (...) E-Recruiting (...) E-Care (...) Smart-Home (...) Online-Volunteering (...) Cybermobbing (...) Cybergrooming (...) Phishing (...) Internet-Governance (...) Privacy by Design (...) Privacy by Default (...) Safe-Harbour (...) Open Data (...) Open Government Partnership (...) Law - Made in Germany (...) Score Board (...) Two-Back (...) Smart-Defence (...) Peacekeeping (...) Responsibility to Protect (...) pooling and sharing (...)"

plukita de Walter Ullmann

gepflückt von Walter Ullmann

Kun bedaŭro ni anoncas la morton de niaj  
fidelaj membroj:

23.10.2013

Reinhard Stoll el Roth  
en aĝo de 73 jaroj

04.12.2013

Alfred Engroff el Weiterstadt  
en aĝo de 85 jaroj

Mit Bedauern zeigen wir den Tod unserer  
treuen Mitglieder an:

23.10.2013

Reinhard Stoll aus Roth  
im Alter von 73 Jahren

04.12.2013

Alfred Engroff  
im Alter von 85 Jahren

Redaktofino por FE 3/2014 estos la  
15.08.2014

Eldono: Stiftung Bahn-Sozialwerk  
Zentrale Frankfurt/M.  
Redakcio: Guido Brandenburg  
Adreso: Görlitzer Straße 17  
48317 Drensteinfurt  
Telefono: 02508-9107  
Fakso: 02508-984511  
Retpoŝto: fervoja.esperantisto@t-online.de

Donacoj estas bonvenaj sur konto:  
Nomo Karl Bernhard GEFA  
IBAN: DE1650090500000953729  
BIC: GENODEF1S12

Redaktionschluss für FE 03/2014 ist  
15.08.2014

Herausgabe: Stiftung Bahn-Sozialwerk  
Zentrale Frankfurt/M.  
Redaktion: Guido Brandenburg  
Adresse: Görlitzer Straße 17  
48317 Drensteinfurt  
Telefon: 02508-9107  
Fax: 02508-984511  
Email: fervoja.esperantisto@t-online.de

Spenden sind willkommen auf dem Konto:  
Name Karl Bernhard GEFA  
IBAN: DE1650090500000953729  
BIC: GENODEF1S12